


Ateismo

Bulteno de Ateista Tutmonda Esperanto Organizo

<http://www.iespana.es/ateismo/a3.htm>



En Dio li konfidas

N° 2-3 (de la nova epoko)

Decembro 2002

La celoj de ATEO

ATEISTA TUTMONDA
ESPERANTISTA ORGANIZO

- 1 Kunligi esperantistajn ateistojn kaj liberpensulojn.
- 2 Disvastigi Esperanton inter ateistoj.
- 3 Defendi propran egalrajtecon kaj kontraŭi trudadon de religio en neŭtralajn Esperanto-grupojn.
- 4 Instigi ĉe neŭtralaj Esperanto-grupoj, ke oni egale varbu por Esperanto ĉe nereligiaj grupoj se oni varbas ĉe religiaj grupoj.
- 5 Akceli racian pensmanieron en Esperantujo kaj pri Esperanto mem kaj strebi altigi la intelektan kaj kulturen nivelon de Esperantujo.
- 6 Libere diskuti kaj analizi ateismajn movadojn, politikojn, kaj filozofiojn kaj ĉiajn rilatajn sociajn problemojn.
- 7 Malkateni la mensojn!

Kovrilo: la nova papo de malnova religio de perforto. Nun li klopodas merkatiĝi sian militon.



La estraro de ATEO:

Prezidantino: Claude Nourmont.

Vicprezidanto: Neil Blonstein.

Sekretariino: Helga Rapley.

Kasisto: Dieter Rooke.

Voĉdonantino: Anna Lowenstein.

Redaktoro: Jesuo de las Heras.

GRAVAJ NOTOJ:

- 1 Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.
- 2 Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon**.
- 3 Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mistraktas iun ajn personon.
- 4 Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.

Enhavo

Manĉeto	2
Redaktore	3
La timo de la morto	4
Animo	9
La rilatoj scienco-religio	14
La ateisma eduko de infanoj	17
Scienco, laŭ religio	19

Redaktore:

Kunveno



Ni jam venis de la kongreso de Fortalezo, kaj tie ni vidis, ke nia asocio renaskiĝas kun novaj fortoj kaj intereso de multe da samideanoj. Ne ĉiuj aliĝis al nia asocio, sed tio ne vere gravas, ĉar ne temas pri sekto, sed pri sinteno antaŭ la vivo. Kompreneble, helpas la kotizo de novaliĝintoj, sed tio venos iom post iom, kiam evidentiĝos, ke la asocio denove vivas.

Ateisto vere ŝajnas fakisto pri io, kaj vere ateaj homoj vere konfesas, ke ni ne scias, ni ne kredas, sed vere ni ne scias pri dio aŭ iu ajn alia magia aŭ fantazia estaĵo, kiu solvos niajn problemojn. Sekve, ni mem klopodas solvi ilin ĉiun tagon, kun diversa sukceso.

En la kunveno de Fortalezo oni elektis novan estraron, akirante novan Vicprezidanton, Neil Blonstein. Bonvenigata vi estu, Neil. Nia antaŭa vicprezidantino, Claude Nourmont, estas nova prezidantino, kaj la aliaj postenoj restas same: Sekretariino: Helga Rapley, el Francio, Kasisto: Dieter Rooke, el Svislando, Voĉdonantino: Anna Lowenstein, el Italio, kaj Redaktoro: Jesuo de las Heras, el Hispanio. Ni danku Ralph Dumain pro sia ofico dum la plej obskuraj tempoj de nia asocio. Li senlace eldonis la bultenon

Ateismo, ĝis kiam li ne plu povis fari tion. Mi esperas, ke tiuj tempoj neniam venos denove, kaj de kongreso al kongreso ni havu iom da aktiveco ĉu individue, ĉu are.

Longa estis la vojo, de la kongreso de Berlino, kie ni kunvenis en koridoro, ĉar neniu kredis, ke ATEO povus daŭrigi sian ekzistadon. Poste, en Tel-Avivo, kelkaj el ni renkontis kaj deĵoris en budo informanta, kio surprizis kelkajn samideanojn, kiuj ne sciis, ke tia organizo ekzistas inter esperantistoj. Oni vidu, ke *esperantistoj ne estas anĝeloj*, kiel diris Zamenhof! Poste, en Zagrebo, ni denove deĵoris kaj renkontis. Nia kunveno tiam estis pli granda, sed la *assembleo ĝenerala* —se oni povas nomi tiel renkonton de neabonantoj de asocio, kiuj, tamen, interesiĝas pri la afero— ne estis tre afabla, kvankam serioza kaj gravaspekta. Oni plendis tiam, ke la bulteno de ATEO ne aperis. Ni disdonis provkazempleron, kaj promesis nenion pli ol kompostadon da artikoloj ricevitaj. Ili alvenas iom post iom, post dua kongreso kaj assembleo, kie, bedaŭrinde, mankis tre valoraj kunantoj, kiuj ne plu estas inter ni. Inter ili aparte mankas al mi Ivo Peyrault, de Francio. En Fortalezo oni antaŭenpuŝis la ideon, ke nia asocio povus funkcii nur en kongresoj de UEA. Tio, vere, ja estas progreso, sed mi opinias, ke en liberpensiga asocio ne povas manki bulteno, kie ĉiu ano povas kunlabori kaj partopreni diskutadon. Mi, tiucele, denove invitas vin ĉiujn, resamideanojn, fari tion.

Penslibero estu kun vi,

Jesuo

LA TIMO DE LA MORTO

de André LORULOT


Se tiom resumita ja estas la nuna studo, mi devas diri kelkajn vortojn pri la mortotimo, kiu ludis kaj kiu ludas ankoraŭ konsiderindan rolon en la vivo de la religioj.

La sovaĝulo malkontestas, ne komprenas la *naturan morton*.

Por li, la morto estas ĉiam la rezulto de "malbeno". Ĉiam estas la spiritoj kaj la reaperantoj kiuj kaŭzas la malsanojn kaj la morton. Sed la spirito ofte obeas al la sorĉistoj... Oni havigos, per ĝusta laborpago, la favoran helpon de la sorĉisto. Se oni suspektas tiun aŭ tiun personon, malamikon de la forpasinto, esti ŝetinta sorton kaj esti respondeca pri lia morto, oni ne hezitos, por venĝi la malaperinton, frapi kaj mortigi la konjektitan kulpulon. Estas la nura maniero kalmigi la animon de la mortinto, kiu vagas en la tenebro petante justecon... Kiom da amasbuĉoj estis kaŭzitaj far tiu kredo, far tiu timo *de la mortinto*.

Ĉar oni timis la mortinton, la individuan kadavron antaŭ ol timi la morton mem, la destinon kiu atendas nin transtomben. Oni maltrankvilas precipe antaŭ la venĝaj perfortoj de la forpasinto, kiu estus tentata pentopagi vin, postmorte, la mizerojn, kiujn vi ilin eltenigis dum lia vivo. En rimarkinda

verko (1), S-ro Luketo (Luquet) montris, ke tiuj sentoj regis la homaron jam la plej foran. Efektive, en la grotoj kaj kavernoj esploritaj far la prahistoria scienco, oni malkovris tombolokojn, kiuj indikas la timon de la kadavro. Oni enterigis tiun kun manĝaĵoj, vestaĵoj, armiloj, ofero kiun oni ne konsentus se oni ne timus provoki malkontenton pli malpli pereiga flanke de la forpasinto - kies animo "revenus" venĝo-dezire persekuti la sendankulojn, kiuj mankias al li estimon!



La unuaj homoj donis oferojn kaj donacojn al la spiritoj kaj al la dioj, mastroj de ventoj, de pluvo, de fulmo, disdonantoj de bonfaroj kaj fruktodonaj ĉasadoj. Ili ankaŭ donos al la forpasintoj por havigi ilian okultan protekton —aŭ almenaŭ ilian bonvolan neŭtralecon.

La bazo de tiu kredo estas la certeco, ke la mortinto konservas sian konscion kaj sian personecon kaj ke ĝi povas daŭre

(1) *La Religion et l'Art aux temps préhistoriques*, (=La Religio kaj la Arto en la prahistoriaj tempoj) Parizo 1927.



agi, fari bonon, aŭ malbonon, al la vivanto (kiuj samproportcie defendas sin pli malfacile ol ilia kontraŭulo, nevidebla, estante nekaptebla).

LA SENMORTA ANIMO

De kie devenas tiu kredo en la supervivo de la homa animo?

Oni klarigis ĝin per la fenomeno de la sonĝo, kiu realigas ian dupartiĝon de la personeco.

La sovaĝulo sonĝe ekvidas la mortinton - amikon aŭ malamikon. Tamen, li estis morta, inerta, putrigita ; oni lin subteren enŝovis aŭ brulis. Kaj lia bildo nokte venadis, malgraŭ ĉio, viziti la dormanton. Ĝi lin parolis, ĝi eĉ riproĉis lin en iuj kazoj. La primitiva homo ne povis scii, ke nur temis pri bildo ; ke la vido de la mortinto estis reala

nur en siaj subkonsciaj ĉeloj de sia cerbo. Por li, tiu bildo estis la *dupartigo*, la *animo*, la *animo* de la mortinto - kaj Ĝi daŭre vivis, sur alia nivelo ol la nia¹.

Kiom da spiritistaj homoj ĉiutendencaj restis ligitaj al tiuj konceptaĵoj!

Ekde Empedoklo kaj Platono, kiuj kredis je la homa animigrado (metempsikozo²) ĝis niaj modernaj teozofoj kaj malmateriistoj, la homaro ŝajnas lokigi sian esperon

en tiu profunde egoisma volo ne malaperi kaj ĉiupreze *sin postvivi*, sub la individua formo kiu estas al ni kara.

La *senmorteco* de la animo estis majstra maniero de regado.

Kaj plia helpilo trovi vivrimedojn, se oni taksas tion, kio okazis ĉe la egiptanoj:

"La pastroj ne nur kolektis impostojn sur la vivantoj kaj la produktadojn de la tero, rentaj ŝuldoj estis establataj sur la mortintoj. Ili posedis la mortintejojn: ĉiu mumio deponita en tiuj vastaj katakomboj pagis ĉiujare fiksitajn prezon." Klobeo (Clot-Bey), citita far Ŝos. Malea (Jos. Mallet). - Hodiaŭ ankoraŭ la kulto de la morto kaj la celebrado de la enterigoj konsistigas la plej grandan parton de la Ekleziaj enspezoj.

(1) Oni pretendas ke la son_oj de S-ro Lidbitero (Leadbeater), unu el la grandaj mastroj de la Teozofio, ludas grandan rolon en la orientado de la Teozofia Societo...

(2) La drinkulo rekarniĝis en la korpo de azeno; la ŝtelisto, en tiu de lupo; la tirano iĝis falko.

Frueke, iaj sovaĝaj gentoj pasie ckinteresiĝis pri malegaleco (la Tonzoj, ekzemple) rezervis la privilegion de la reenkarniĝo al la nuraj animoj de la nobeloj. La animoj de la vulgaro estis kondamnitaj al neniigo.

Tiu teorio ne supervenkis. La pastroj kaj la riĉuloj efektive sentis la grandan avantaĝon kiun ili trovas lasante al la malriĉuloj la esperon de iu kompenso...transmorten. Estis plia rimedo regi la amasojn, per la timo, aŭ per la espero, kaj ilin konservi en sklaveco.

Ju pli la popoloj estis malfeliĉaj, des pli fortaj estis iliaj sopiroj al tiu postvivo kaj ilia deziro eniri la Paradizon, kion la religioj al ili antaŭvidetigis... en alia mondo. Tiel, la homoj estis malofte tiom afliktitaj kiel en la jarcento kiu antaŭis la alvenon de la kristanismo, kio klarigas la grandan sukceson de ĉi tiu, portinto de novaj esperoj kaj de pompaj promesoj rezervitaj al la humiluloj kaj al la elĵetuloj.



Mi ne insistos pri la grava loko, kiun la kulto de la mortintoj okupis en la religioj mem. La *Postmortdiĝo* klarigas, ke la kulto de la dioj devenas ofte el la kulto de la mortintoj. Iuj religioj (en Orienta Azio, ekzemple) estas tute bazitaj sur la devoj donendaj al la animoj de la prauloj. Ĉiuj tiuj praktikoj devenas, nediskuteble, el la timaj kaj teruraj sentoj afliktitaj antaŭmorte, kiel mi jam tion diris.

ĈU LA RELIGIO KONSOLAS?

La religioj al ni riproĉas malaltigi la homon kaj lokigi lin "je la besta nivelo", rifuzante al li la senmortecon kaj esperon retrovi siajn mortajn parencojn.

Se ne ekzistas alia vivo ol ĉi tiu, al kio utilas bonfari tiumonden? La malbonulo kaj la krimulo, se ili eskapas dum ilia vivo al la puno de iliaj malbonagoj, almenaŭ devas havi la certecon malmolkore pentopagi postmorten la malbonon, kiun ili faris sur la tero.

Estas la ununura haltigilo kiu povas malhelpi la egoismon definitiv-maniere triumfi. Forigu la kredon en la senmorteco kaj la homo perdos sian esencan kialon por agi kaj batali, sian precipan stimulon. Al kio utilas penfari ĉar restos el ni nenio? Ĉu ne estus pli saĝe por ni absorbiĝi en la teraj plezuroj kaj la animalaj ĝojoj, ĉar ekzistas nenion alian?

Oni ne preterlasas aldoni ke la espero revidi, en alia mondo, la amitajn estulojn, kiujn ni perdis, alportas al la homa animo altŝatatan konsolon kaj al ĝi permesas pli facile elteni la elreviĝojn kaj la neeviteblajn funebrojn.

Tia "konsolo" ŝajnas al mi tre naiva. Estas iom insulti la homan konscion sin helpante per tiuspecaj artifikoj por helpi lin elteni la pezon de la doloro. Ni devas trovi en ni mem sufiĉe da stoikismo por rigardi vidalvide la kruclan Destinon kaj por plenumi, malgraŭ ĉio, kuraĝe, la taskon, kiu nin koncernas.



Ni rimarkigos ke la kredo en la senmorteco "ne sin mendas", ne pli ol ĉiu alia kredo. Oni ne estas libera esti aŭ ne esti spiritisto. Kiam ideo ŝajnas al ni malvera, ni estas ja devigataj ĝin dejeti, tiom aflikta estu ĝi por ni tiu forlaso.

Temas, antaŭ ĉio, pri konceptigo vere raciista de la vivo kaj morto.

La kredo en la individua postvivo povas nur kreskigi egoismon, la "personismon".

Reale, *la morto ne ekzistas*. Tio, kion ni signas sub tiu vorto estas nur nova formo de la universala vivo.

La individuaj formoj discriĝas kaj reiras al la ĉiama cirkulado, sine de la grandega Kosmo.

Lorulot, Dupont, Durang, ne plu ekzistos kiel determinitaj personecoj, sed la elementoj el kiuj ili estas kunmetitaj (oksigeno, hidrogeno, nitrogeno, ktp.) ne estos dutruitaj. Tiuj elementoj transformiĝos kaj daŭre vivos aliaspekte;

ili eniros en la kunmetadon de novaj, individuaj kaj organikaj kombinaĵoj.

Antaŭ esti Dupont, Lorulot aŭ Durang, kio ni estis? Spite al la iluzioj de la reenkarriĝo, ni perfekte scias, ke ni ne ekzistis. Ni estas la plilongaĵo de ĝermo kiu disvolviĝis sine de iu medio kaj kiu alvokiĝas refandiĝi en la granda krisolo de la senĉesaj viv-transformiĝoj.

Ĉio, kio estas vivanta destinitas tiel evolui. La organismo grandiĝas kaj disvolviĝas, bebnaskas, maljuniĝas kaj fine mortas. Estu herbepeco, insekto, aŭ homo, la leĝo kiu regas la vivantaĵoj estas nepacigebla.

(Iaj nuntempaj biologiistoj tamen demonstris, ke ekzistas animalaj specioj kiuj elmorten eskapas. Estas specioj tre malsuperaj. La animaloj kiuj anas ĝin vivas senfine. La morto do estus vera venko de la evoluado. Ĝi celus reagi kontraŭ la iompostioma kaj neevitebla eluzado de la senmortaj individuoj. La morto permesus al la specio renoviĝi kaj perfektigi sin.)

Tia fenomeno do ne meritas esti terure konsiderata. Ni devas serene konsideri

la morton, sen ia ajna ektimo. Tiuj kiuj timas la morton estas malkleruloj, aŭ sentimentaluloj trompitaj far ilia imaggo.

Se la homoj havus ekzaktan kaj precizan koncepton pri la evoluo kaj la transformismo, pri la deveno de la organizitaj estaĵoj, pri la profunda senco de la vivo kaj la morto, pri la vera loko kiun

ili okupas, ili alirus al admirinda filozofio —kiu senpene triumfus la naivajn ekterurojn kaj la sultigajn fablojn de la religioj.

Nia filozofio, for el la homa malaltigo, permesas al ĝi leviĝi super sia efemera personeco. Ĝi ekkoncias la rolon ludota en la universala vivo, kiun ĝi integre onas. La individua egoismo cedos la lokon al la konscia kunsento de la estaĵoj, al la agiga kaj rezonbazita solidareco.

Ĉu ne estas pli morala labori por aliuloj ol simple labori por si mem?

Ĉu ne estas pli bela sin dediĉi por la homaro ol ununure pensi pri sia malfortika persono?

Jen du homoj, egale honestaj. Unu bezonas, por fari la bonon, kredi en Dio kaj la senmorteco. La alia faras la bonon pro la amo de la bono; tiu atendas



nenian rekompencan kaj timas nenian punon.

Kiu estas la plej morala el ambaŭ?

Nenia dubo pri tio: la morala homo bezonas neniun ĝendarmon por sin kondukti! Tiu portas sian propran leĝon en sia konscio. La kontenteco plenuminti sian devon estos la nura rekompenco kiun li ambicios. Estos la malfortuloj kiuj igas necesaj la trudadojn kaj la eksterajn regulojn. Konscia homo ne bezonas religion, ĉar ĝi estas edukita, ĉar li posedas kondutan regulon bazitan sur racio kaj sperto.

Animo

Saluton, Agnes. Mi estas Marisa.

Vidu, Agnes, antaŭ kelkaj tagoj, dum ke ni ĝisantis, demando restis en la aëro: «La animo, kio estas la animo?», vi demandis. Ĉu vi memoras?

Ne, ne tiam havis mi tempon respondi tion, kion mi opinias pri la animo. Tial mi skribas ĉi tiun leteron, por diri al vi kiajn estas miaj ideoj pri ĝi.

Pardonu, se mi estas iomete skeptika pri ĝia ekzisto, sed ŝajnas al mi, ke tio estas unu el la grandegaj mensogoj, kiujn homo elpensis pro sia granda ingoranteco. Ideo pri kiu oni konstruis ĉiajn ajn tipojn da kredoj.

Ne, mi ne kredas, ke estis intencita mensogo, simple tio, ke pro nescipovo katalogi ĉiujn fenomenojn kunestantajn al nia ekzistado, iu pensis nomi animo tiun aron da fenomenoj.

Fizika korpo estis pli facile vidi, tuŝi, kapti. Sed estis kelke da fenomenoj strangaj, kiujn oni ne facile komprenas; pensojn, sentojn, kialojn, intuado, imagado... Serion da eblecoj, kiuj diferencigas nin de aliaj specoj kaj kiuj, en nia orgojlo kaj aroganteco, igis nin senti nin superaj al aliaj specoj. Tiu sento pri supereco estis tio, kiu portis nin konsideri nin ne nur bestoj kun kapablo kaj evoluo malsamaj.. Ne sufiĉis al nia orgojlo homa, ni bezonis ion, kio

justigu nian regadon sur la ceteraj specoj, ion, kio igu nin ne nur malsamaj, sed ankaŭ superaj, sed ĉefe eternaj. Kaj per nia imago ni kreis la animon. Ankaŭ sur ĝi iu elpensis la ideon tian, ke ĝi estas eterna, ke ĝi venis rekte de la manoj de Dio, kaj al liaj manoj ĝi venas post morto. Ne interesis al ni, kaj ankaŭ nun ne interesas, pensi, ke post kiam ni mortos, ni malaperos en procezo sufiĉe naŭziga, same kiel la ceteraj bestoj, same kiel la ceteraj vivantaj estaĵoj.

Aliaj homoj, per ne malpli da imagopovo, imagis, ke animo reenkorpiĝis, ke ĝi vivis sinsekvajn enkorpiĝojn uzante diversajn korpojn ĝis kiam ĝi venos al vivo perfekta, tial liberigita de novaj reenkorpiĝoj.

Estas tre variataj la uzoj, kiujn unuj kaj aliaj faras de tio, kion oni kutime nomas animo. Triste estas, ke multe da tiuj uzoj celas nur katenigi nin. Nia senmorta animo utilas nur al tio, ke aliaj homoj plenigu kaj regu nin per kredoj, kiuj konvenas al ili.

Ni devas esti “bonaj”, por tio, ke nia animo estu perfektigata, kaj venu finfine al Dio, aŭ por rompi la ciklon da reenkorpiĝoj, kiuj permesu al ni ĝui eternan pacon, anstataŭ esti ĉirkaŭitaj de la mizeroj de tera vivo.



Sed kio signifas *esti bonaj*, Agnes?

Eble ĝi nur signifas, ke ni faru tion, kion homoj, kiuj memnomigas sin paroltuboj kaj interpretistoj de tio, kion neniu scias bone, diras, ke estas bone fari, kaj ke ni evitu tion, kion tiuj homoj diras, ke estas malbone. Ĉu vi komprenas, Agnes?

La animo, tio, kio diferencigas nin kaj superigas nin rilate al la ceteraj bestoj, finfine estas la kateno per kiu povuloj ligis nin al ideoj kaj kredoj, kiuj interesis ilin. Per ĝi kaj ĝia eterna daŭreco, ili trovis la vojon regi nin tiel, kiel ili deziris.

Post ne multe da tempo kelkaj homoj konstatis, ke senmorta animo estas tro libera, ĝi ne konvenas bone al liaj interesoj, oni nepre subigu kaj regu ĝin. Sed tio ne estis facila tasko: libera animo povas trovi tiom da konceptoj pri bono kaj malbono, kiel oni volas. Eĉ ĝi povas ŝanĝi la koncepton pri bono kaj malbono, laŭ la tempo, laŭ ĝiaj interesoj, laŭ ĝiaj travivaĵoj. Ĉiu homo havis kaj havas siajn proprajn konceptojn pri bono kaj malbono. Plej multe da fojoj ne estas maniero scii kial io estas pli bone ol alia afero, kial ideo estas pli bona ol alia.

Tiel, homoj ariĝis laŭ simileco da ideoj, laŭ aroj da kredoj pli aŭ malpli samaj; sed eĉ tiel ne estis facila tasko: tiu, kiu hodiaŭ pensis same kiel vi, morgaŭ povas halti kredi je ili, eĉ batali ilin.

Kaj tiel oni iom post iom oni vidis, ke estas necese krei administrantojn pri animoj kaj kredoj, la diojn.

Homaj grupoj havantaj la samajn kredojn sentis sin solidaraj, fortaj, povaj. Estis vojo preskaŭ perfekta regi kaj subigi ne nur la bestojn, sed ankaŭ aliajn homajn arojn, senigi ilin de lia lando, subigi ilin, devigi ilin fari laboron, kiun neniu volis fari ĉar ĝi estas laciga kaj humiliga.

Ni bezonas senti arecon al grupo, tion, ke niaj ideoj oni akceptas, kunhavas kaj respektas, kaj ĉiam ilin oni povas perforte akceptigi.

Sed eĉ tiel, ideoj kaj kredoj estis, estas tro flugeskaj: sufiĉas konversacio, argumento nova aŭ diversa semi dubon, igi tion, ke homo, kiu antaŭe kredis same kiel vi, ne plu faru, kaj eĉ li venu al kredo mala.

Kion ni povas fari por eviti ĝin? Tio estas relative facile, Agnes: ni kreu administranton pri konscioj, pri kredoj, pri animoj, ni kreas diojn. Estajojn superajn kaj unikajn, tiom eternaj kiom niaj animoj, por tio, ke li povu interkompreniĝi rekte kun ili, perfektaj estaĵoj, vestigitaj per aŭtoritato morala senlima, kaj ni vortigu ilin diri tion, kio interesas al ni. Estu ili tiuj, kiuj diktas normojn kaj konceptojn pri bono kaj malbono, kiuj plej konvenu al ni. Estu ili tiuj, kiuj difinu niajn konceptojn pri bono kaj malbono, estu ili tiuj, kiuj tra nia perado akceptigu niajn ideojn. Estas



facile malfidi ideojn de homo, sed estas ĝi malfacile defii ilin kiam homoj diras, ke ili parolas nome de dio aŭ de la dioj.

De tio estas facile malestimi kaj subenigi tiujn, kiuj kuraĝu defii aŭtoritaton de tiuj dioj. Li ne plu defios nek niajn ideojn, ne nian aŭtoritato, li defios la aŭtoritaton de la dioj, de dio. Malestimigo certigas kaj estas subtenata de ĉiu fidelulo al tiu kredo. Tiu, kiu forlasas kredon, perdas animon, li perdas tion plej valoran sian, li perdas kondiĉon de homo. Tial ni pli frue atribuis nin animo kiel diferenciga al cetero da bestoj. Eĉ estas malestimita tiu, kiu ankoraŭ ne kredas same kiel ni, li ankoraŭ ne havas animon...

Eĉ tiel, Agnes, ankaŭ ne estas facile meti ordon en kredoj kaj animoj: ĉiu grupo, ĉiu popolo, havis siajn proprajn, kaj iliaj gvidantoj alkuris al ili ĉiun fojon, kiam ili konsideris ĝin necesa al siaj intereso, por lanĉi sian grupon al batalo kaj milito, por plivastigi siajn teritoriojn, konkeri kaj venki tiujn, kies dioj estis aliaj, tiujn, kia animo estas diferenca. Ĉar ŝajnas, Agnes, ke havi malsimilan animon estas same kiel ne havi animon. Tio, kio donas al homo veran animon, estas tio, ke li kredu same kiel ni. Ĉiuj aliaj animoj kaj kredoj estas falsaj kaj kondamnendaj.

De tiuj bataloj, kiujn nia speco generis kaj suferis laŭ sia historio, venis al ni kelkaj dioj, fakte kelkaj administrantoj de ideoj, de animoj kaj konscioj, ma-

nipulaciitaj de kelkaj homoj, kiuj deklaras sin ĝiaj paroltuboj. Vere ili nur estas la ideoj, kiuj malmulte da homoj havas pri la konceptoj de bono kaj malbono, tiuj ideoj, kiujn ili nomas dioj, kaj dioj estas nenio diversa al iloj celantaj manipualcii niajn animojn kaj niajn konsciojn.

Tiel ĉi nia animo, tio, kio dekomence celis diferencigi nin kaj superigi nin al ceteraj bestoj, estas tiu, kiu fine sukcesis subigi kaj kontroli nin. Kaj en tiu procezo ni ankoraŭ estas, Agnes. Neniu volas, neniu interesiĝas senti sin alia nura speco, al ni ĉiuj konvenas pensi, ke ni estas superaj al ili, ni ĉiuj interesiĝas pensi pri tio, ke iam, kiam ni mortos, nia animo garantios eternan vivon ien ajn, kie ni eĉ ne scias, kie ĝi estas, kaj kiun ni eĉ ne povas imagi. Kaj kontribuas ni volonte al disvastigado de tiu ideo: kiom da feliĉo ĝi garantias al ni post nia morto! Kiel bone ni fartas, anante al tiu grupo, kiu kunhavas niajn kredojn! Kaj iu pli granda estu la grupo, Agnes, des pli bone. Tio certigas al ni, ke ne ĉiuj ni povas erari. Se inteligentaj homoj en nia grupo kredas tion, ne eblas, ke ni eraras, kaj ni delegas en ili niajn dubojn, same kiel ŝafoj tre bone dresitaj.

Ne gravas, ke realo malverigu tion ree kaj ree. Ne gravas, ke ĉiun tagon nia vivo diras al ni, ke tiuj kredoj nek estas realaj, nek ŝajnas, ke ili iam estos tiaj. Estas pli bone kredi, ke tiu feliĉo, kiun oni neigas al ni ĉi tie, en la Tero, estos vaste



kompensata post nia morto. Feliĉe por ili, neniu venis de postmorto por kontraŭi iliajn kredojn!

Sed eble vi demandas, kie estas la homa animo. Respondo estus same kiel tiu, kiun mi diras: en la cerbo. Hodiaŭ ni havas malmulte da duboj pri tio, ke la amalgamo da fenomenoj, kiu karakterizas nin kiel homajn estojn, kuŝas en nia cerbo. Kaj el kio estas nia cerbo farita, Agnes? De materio, de la samaj atomoj, de la samaj elementoj, de la sama materio kiel la cetera universo estas farita. La sama materio organizita per alia maniero, organizita per strukturoj kaj proporcioj, kiu permesas, ke tiu serio da fenomenoj ekzistu. La sama materio, kiu inter teruraj eksplodoj kreas, en aliaj partoj de la universo, galaksioj kaj steloj, en mia cerbo, en tiu via, generas ideojn, pensojn kaj sentojn. Il ine

estas pli ol kvadrato al kiom materialiaj ili ŝajnu al ni.

Finfine, tio, kion ni nomas nia *animo*, estas nur ĥemio, aŭ, dirante ĝin eĉ pli simple, nur interŝanĝo da elektronoj.


Mi certas, Agnes, ke se vi estus ĉi tie, vi demandus se tio, kion mi celas diri, estas, ke se

pensoj, sentoj..., unuvorte: la animo, ne estas pli ol manifestacioj de materio. Jes, Agnes, mi konsideras tion. Se nia cerbo estas materio, kaj nenio pli ol materio, kio ajn alia afero povas esti animo? Sed eble, Agnes, pensi tion ne interesas al ni, pensante tiel finiĝas maĝio, finiĝas pensi pri superaj kreistoj, kiuj diras al ni tion, kio estas bone kaj malbone; eble pensante tiel, oni komencas denove la serĉadon pri la vero, sen alia gvido ol nia kono.

Eble interesas al ni kredi tion, kion aliaj diras, sengrave al tio, ĉu ĝi estas vera aŭ malvera, ĉar tio estas grandega vojo, jam marŝita de aliaj je kiu aŭtoritato interesas al ni kredi. Eble ni scias, ke se kelkaj ne mensogas al ni, aliaj mensogos al ni, kaj se ni vere devas vivi en mensogo, estas pli bone kredi, ke ni venas de Dio, ol kredi, ke ni venas de simio.



Kaj se fine ni venas al konkludo, ke animo eterna ne estas, ni perdus la eĝan premion de eterna vivo; eble se ni pensas, ke nia animo mortos samtempe



kiel nia korpo, eble ni ne plu trovos sencon al vivo.

Eble tial plej multo da homoj preferas kredi, ke ili havas animon, animon **eternan**, kaj ke Dio tiom bona kiel nia animo, zorgos pri ĝi, kiam ni mortos.

Vere Dio, dioj, estas ideoj nek gravaj nek fundamentaj, sed nur duagradaj ideoj. La vera ideo grava estas eĉ ne la animo, sed “eterneco” de la animo. Se oni venas al konkludo, ke io ne estas eterna, estu ĝi animo, aŭ io ajn alia, oni bezonos administranton de tiu parto eterna post la morto. Kaj tiun administranton homoj nomas Dio. Sed se oni venas al konkludo, ke nenio en oni estas eterna, oni ne bezonos tiun dion por io ajn, ĉar estas nenion administri post la morto.

Kiom ajn sindonan ŝajnu la ideo pri Dio, vere ĝi estas nur la sekvo al nia egoismo privata askuri al ni la ETERNECON, kaj al socia egoismo askuri kontrolon de homoj de aliaj homoj.

Ĉu vi komprenas, Agnes, kial ideo pri dio disvastiĝas tiom facile? Ĉar ĝi respon- das al niaj privataj interesoj, kaj al inter- reso de tiuj, kiuj regas nin tra mastrumado de manipulacii nian eternecon.

Ambaŭ interesoj koincidas, tial estas tiom facile disvastigi la ideon. Ne gra- vas, ke tio malveras, ne gravas, ke tio estas mallogika: nur gravas subteni nian esperon, kaj espero estas la lasta afero, kiun oni perdas, ĉar interesas al ni ne perdi ĝin.

Ĝis, Agnes. Vi jam scias, ke vi ne ekzistas: vi estas nur rolo kreita de mia menso, por ke mi povu skribi tiun ĉi leteron al vi.

Marisa



La problemo pri la rilatoj scienco-religio

Jozefo J. Lunazzi

Tiu problemo daŭras, eĉ se ne ofte aperas en sciencaj ĵurnaloj kaj artikoloj. Oni diskutas ĉu sciencisto povas krei je Dio aŭ ne, kaj grava ekzemplo estas la kazo de Einstein, kiu menciis Dion rilate al Scienco: «Mi ne kredas je Dio ludante per jetkuboj por la universo», «Mi volas koni la pensmanieron de Dio».

Sed estas fakto ke oni ne vidas iun mension al Dio en nuntempaj sciencaj fakaj artikoloj, kiel jam okazis antaŭ kelkaj jarcentoj.

Por konsideri la problemon, ni devas pensi je la plej veraj sciencistoj, tiu kiuj esploras kaj elkovras faktojn, ne tiuj, kiuj aplikas ilin. Kuracisto, ekzemple, ne povas esti konsiderata sciencisto sed scienca aplikanto.


Inĝeniero, same. Estus interesa scii pri la Nobel Premiitoj: ĉu ili mencias Dion en liaj prelegoj al la Sveda Akademio, okaze de la premia ceremonio?

Kiel por mi loka ekzemplo de la ekzisto de la problemo, mi mencias la monatan revuon de la Fondaĵo por Scienca Disvolvado de Provinco Sankta Paŭlo en Brazilo, nomata FAPESP. En artikolo publikita en marto de 2000, kiam raportas pri morto de la brazila sciencisto Carlos Chagas Filho. Li estis konsilanto de la Papo pri Sciencaj Aferoj, kaj laŭ la artikolo diras, helpis por la pardono kiun la katolika eklezio donis al Galileo Galilei. La artikolisto skribis ke Chagas sukcesis kunigi sciencon kaj religion, tiel montrante la afero

kiel ne evidenta. Sed li ne klarigas efektive kiamaniere Chagas faris tion, ĉu laŭ persona pensado kaj agado aŭ ĉu ĝenerale, por la mondo, kaj por ĉiame.

Mi kredas ke li agis laŭ nekonflikta persona pensado kaj agado, ĉar kiel ĝenerala solvo mi ne povas vidi tion. En la kazo Galileo, ekzemple, ne estas la katolika eklezio kiu devas pardoni Galileon, sed Galileo (se tio eblas) kiu devus pardoni la Katolikan Eklezion. Galileo devis rezigni publike pri lia opinio, kiu estis rezulto de esplorado, por ne suferi gravan punon, kiel ekzemple morto pri bruligado. Afero kiu estis ofta en tiu epoko kaj jam antaŭe atinginte al Giordano Bruno en Romo, kiu menciis similajn propaĵojn por nia planedo Tero ne estante la centro de la universo. Nur post jarcentoj dum la aserto de Galileo estis pruvita, tridek jaroj post homoj vojaĝis al Luno, la Katolika Eklezio pardonas lin. Laŭ mia kono, li ne pardonpetis, ne pentis.

Alia forta ekzemplo pri la problemo estas havi, en la nacio pli pova kaj unu el la plej modernaj de la mondo, Usono, ŝtatojn, kiuj malpermesas la instruadon de la teorio de evoluo de la vivantaĵoj. Tiun de Darwin, ĝenerale akceptata de la scienco, eĉ se mankis al Darwin datumojn por perfektigi la teorion laŭ modernaj ebloj (eĉ se malfacile oni povas apliki ĝin al la traktado de molekulaĵ vivantaĵoj).



Ĉu la nomo de Darwin devus atendi la saman daŭron ol tiu de Galileo por esti *pardonita* de la eklezio? Kiuj faras tion agas laŭ **La Biblio**, kredante je kreado de la mondo laŭ estas tie skribite, pere de la kreado apartaj, ne rilataj, bestoj. La homo estante aparta al la ĝeneralaj bestoj, kaj la kreado okazinta antaŭ nelonge, kelkaj diras, antaŭ 40.000 jaroj maksimume.

En iu ŝtato oni jam enkarcerigis profesoron, kaj en la ŝtato Kansas oni ankoraŭ malpermesas tion. Sed ne estas nur la leĝa decido de tiu kazo kiu kolerigas min, sed la manko de reago de la scienca komunumo, usona kaj monda.

Estas urbo Kansas City en najbara ŝtato Missouri, tre proksima, kaj mi pensas ke tie oni devus starigi grandan muzeon pri Darwin, por permesi almenaŭ al la civitanoj el Kansas provinco la eblecon klopodi scii pere de ili mem kial Darwin estus fuŝa, aŭ ne. Bedaŭrinde, la forto de eklezioj ankoraŭ faras homojn silenti pri lia penso, ne pro timo de morto, sed pro alia speco da timo. Ĉu vi samopinias?

Kiel loka ekzemplo ankaŭ, mi devas mencii la revuon de Brazila Esperanto Ligo «Brazila Esperantisto», kiu en ĝia lasta eldono de julio 2002, distribuita al ĉiu partoprenanto de la UK en Brazilo, enhavas du artikolojn kiuj baziĝas sur la biblio por pritrakti la temon *scienco* kaj la temon *religio*.

La unua artikolo «Profetado: afero de scienca eksplorado», p.11, pekas pro la redaktoro titoli la temon «Scienco», anstataŭ «Voko por scienca eksplorado». Tiu konfuzo,

ne estas tiel eta, kiel oni povus supozi. Baziĝas ĝi pri aserti la divenon de la estonteco pere de profetoj kaj, escepte tiu de Nostradamus, la pruvo estas historio laŭ skribite en La Biblio. Asertas ĝi ankaŭ la mankon da efiko de la scienco por klarigi tiujn «faktojn», mencias mankon da intereso de la de li nomata «oficiala» scienco, sed finfine fidus je estonta sukceso de scienco por fina kompreno de la

«fenomeno». Postulas ankaŭ la problemon «Se la estonteco

estas konata de kelkaj, kio tio signifas por la rolo de la libera volo de la homo?»

Pravigas lian aserton la mencion pri la fama sciencisto Newton, kiu dediĉis plurajn librojn al temoj kiu oni ne povas konsideri kiel scienco. Laŭ la artikolisto, li skribis pri bibliaj profetaĵoj. Bone, mi lasas por vi, leganto, juĝi

ĉu la artikolo estas intenco distri la racian konon de la vivo

kaj enkonduki en religian ne racian pensmaniero, ĉu ne.

La dua artikolo, «Neutraleco kaj laikeco ĉe BEL», p.27, ja estas korekte titolita de la redaktoro kiel «Opinio». Korekta estas la unua kolono de la artikolo, mi volas kritiki kiam, en la dua kolono, oni diskutas pri Spiritismo. Li uzas difinon de tiu movado (laŭ li ne difinita ĉu religio ĉu ne) kiel «scienco, kiu traktas pri la naturo, la origino kaj la destino de la spiritoj, kiel ankaŭ pri iliaj rilatoj kun la enkorpa mondo». Por ekzisto de iu scienco, same kiel por iu religio,



oni bezonas akceptadon de ĝi. Religio ne akceptata de homoj for de ĝi, estas nomata *sekto*. Scienco ne akceptata de homoj for de ĝi, estas nomata *pseudoscienco*, aŭ eĉ *malprava scienco*.

Psikologio postulas ankoraŭ, post unu jarcento, la ĝeneralan akceptadon de ĝi kiel sciencan. Ĉar temas pri ne mezureblaj aŭ facile ripeteblaj faktoj, estas sciencistoj kiuj ankoraŭ dubas pri ĝi. Sed oni ne lanĉis ĝin kiel «scienco», nur uzis sciencan analizon por ĝia evoluo kaj iom post iom ĝi fariĝis parton de la scienco pri sano. La koncernitaj studitaj homoj estas tuŝeblaj, mezureblaj, kaj iel ripeteblaj ili mem laŭ respondo al interveno de la sciencisto. Por la tiel nomitaj «Spiritoj» (mi uzas kaplitteron, por ne konfuzi al la ordinara signifo de la vorto «spirito») oni ne povas tuŝi, mezuri, ripeti. Laŭdire de la Spiritistoj, ili nur aperas en kelkaj tre specialaj okazaĵoj. Simile al la apero de Virgulino Maria, por la katolika religio, aŭ al la apero de Dio kaj dioj en aliaj religioj, sed aldonante la kapablon kelkaj Spiritistoj okazigi ĝin. Oni ne scias pri eksperimentaj procedoj por tiu «SCIENCO», analizmaniero, kaj rezultoj. Pri unu nura eksperimento mi aŭdis: ke la fama literatura brazila verkisto Monteiro Lobato lasis al parenco la indikon de afero pri kiu li parolus poste lia morto, se estus Spirite vokata. Poste la morto de Lobato, la parenco iris al Spiritisma kunsido, kaj la Spirito kiu «aperis», supozeble apartenante al s-ro. Lobato, ne menciis la aferon.

Per tiu skribado mi fakte kontraŭstaras la pravecon de la baza fundamento de Spiritismo. Mi ne volas kontraŭstari ideojn pri faktoj kiuj povas okazi tre malofte, tiel



malfaciligante la aplikadon de la scienca procedo. Sed, se iu diras havi kontrolon de maloftaj aferoj (Spiritoj kiuj aperas nur en tre specialaj momentoj), mi tute ne kredas.

Kelkaj referencoj:

Sveda Akademio pri Scienco, informoj pri Nobel premiitoj:

<http://www.nobel.se/physics/laureates/2000/index.html>

Plia informo pri la temo: <http://www.almaz.com/nobel/>

Revuo «Brazila Esperantisto»: eldonata de Brazila Esperanto Ligo,

www.esperanto.org.br

Artikolo pri Chagas Filho: <http://www.fapesp.br/politica51.htm>

La ateisma edukado de infanoj

Anna Lowenstein, Italujo

Kiam naskiĝis miaj infanoj, mi havis la naivan ideon, ke mi provos ne influi ilian sintenon rilate al religio, sed lasos ilin mem decidi. Mi rapide konstatis, ke tio ne eblas. Eĉ diri nenion pri religio en si mem signifas transdoni ian vidpunkton: ekzemple, mi supozas, ke miaj infanoj ne konis la koncepton ‘dio’ ĝis ili jam havis proksimume kvar jarojn. Alivorte, mi jam komencis transdoni al ili miajn proprajn opiniojn.

Mi loĝas en Italujo, lando trempita en religia simbolaro. Ne klarigi al miaj infanoj mian propran starpunkton pri religio signifus lasi la ĉirkaŭan socion influi ilin anstataŭ mi. Por doni ekzemplon: en Italujo oni ofte trovas apud la vojo malgrandajn adorojn, vitrajn montrokestojn kun interne statuo de Jesuo aŭ la Madono. Venas la momento kiam malgranda infano fingromontras al la statuo de Jesuo kaj demandas, ‘Panjo, kio estas tio?’ Kion oni respondu? Se oni rakontus la vivon de Jesuo sen ajna propra



komento, ŝajnus kvazau oni mem kredus ĝin.

Cetere, membroj de religiaj kredoj tute ne sentas embarason transdoni siajn ideojn al siaj infanoj – eĉ male, ili konsideras tion grava devo. Mi estas same konvinkita kiel ili pri la ĝusteco de miaj opinioj, do se ili ne hezitas influi la sintenon de siaj infanoj, kial mi retenu min?

En italaj lernejoj, kruco troviĝas sur la muro de ĉiu klasĉambro. Krome oni studas religion dum unu horo semajne. Ĝi estas instruata laŭ forte katolika vidpunkto, ĝenerale de pastro aŭ monaĥino. Gepatroj havas la rajton elpreni siajn infanojn el tiu leciono, sed ĝenerale ili ne volas fari tion por ke la infanoj ne elstaru el la grupo. (Tamen lastatempe alvenis grandaj ondoj de nekristanaj enmigrintoj en Italujon, do eble estonte estos pli da infanoj, kiuj ne partoprenas la lecionon de religio.)

Aliflanke, mi ja deziras ke miaj infanoj konu la rakontojn el la

Malnova kaj Nova Testamentoj, kaj ankaŭ ke ili sciu iomete pri la signifo por kristanoj de la okazaĵoj en la vivo de Jesuo. Tiuj legendoj formas la bazon de la okcidenta kulturo, kaj necesas ke edukita homo konu ilin same kiel oni lernas pri la greka kaj romia mitaro.

Ni vivas en epoko, kiam kreskas la fundamentismo. Pliigas la nombroj de fundamentaj kristanoj en Usono, en la araba mondo la islamaj fundamentistoj, kaj mi havas la impreson ke ankaŭ en Israelo estas pli da fundamentismaj judoj ol en la pasinteco. Tiuj homoj edukas siajn infanojn laŭ tre mallarĝa vidpunkto, insistante pri la laŭvorta vereco de antikvaj tekstoj kaj neante la validecon de modernaj sciencaj malkovroj. Se la gepatroj kaj la instruistoj asertas, ke Dio kreis la mondon en sep tagoj, infano nature kredas tion. Kaj certe multaj retenos kiel plenkreskuloj tiujn ideojn, kiujn ili ricevis en la lernejo.

Tio, kion oni instruas al infano, lasas tre profundan impreson. Praktike estas neeble protekti la proprajn infanojn kontraŭ la dubindaj kredoj de la ĉirkaŭa socio. Prefere oni rekonu la neceson mem transdoni tiujn opiniojn, kiujn oni sincere tenas.

Fino de *Scienco, laŭ religio*, paĝo 19-

Ĉu, mi ne havas Dion, kiu protektas min de mia propra stulteco kaj malemo labori. Per laboro homo kreis sciencan —ion, kio vere ankaŭ neniam ekzistis, nur en la menso de homo!—. Kion diras sciencan al ni? Ĉu scienco ankaŭ havas leĝojn kaj dogmojn, tiel, kiel teistoj kulpigas ĝin? Kompreneble, la **Leĝo de graviteco** estas tio, kio ĉiam okazas, trajto, kiun ni havas, kaj kiu gluas nin al nia planedo. Oni diras antaŭ du jarcentoj, ke pro tiu leĝo —kaj dogmo diras—, homo neniam povus flugi, kiel birdoj. Ili ne sukcesis konstati, tamen, ke birdoj jam defiis tiun dogmon, Leĝo de Graviteco, interkrampe... Kaj en la Dudek Unua jarcento homo lernis flugi, se ne same kiel birdoj, pli rapide kaj utile. Homo lernis per la scienco de li inventita, ke Leĝo de Graviteco estas ĉirkaŭebla per aliaj **leĝoj** (tiel diri), kiujn Fiziko studis kaj klarigis. Ne venis *sciencia episkopo* aŭ *ajatolao*, kiu akre kondamnis fratojn Wright kaj ilian **diablan elpensadon**, same kiel oni kondamnis siatempe al Benjamino Franklin pro sia *diabla elpensado*, fulmoŝirmilo.

Scienco neniam agis same kiel la Aĝa Barbulo, ĉion malpermesante, sed male, kiel servanto, servisto fidela, kiu solvis problemojn homajn. Certe, ne ĉiun problemon solvis ankoraŭ, sed iom post iom, problemojn ĝi solvas. Ĉar la monero, kiun homo uzas por pagi al tiu servisto ne estas dolaro, eŭro aŭ denaro. Pli multe kostas persvado, laboro, kaj malfermo da menso. En tiu bildo, kompreneble, ne estas loko por religio. Tial vera sciencisto devas forgesi pri ĝi.

Mursjo, 19 de marto de 2002.

Scienco, laŭ religio

Oni diras, ke ateistoj konsideras, ke scienco estas religio. Religiemuloj diras, ke ateistoj fidas je scienco, kiu ankaŭ havas kontraŭdirojn, kaj ankaŭ ne estas perfekta.

Tiu diraĵo, laŭ mi, estas kohere senseca al teisto. Li aŭ ŝi bezonas transdoni sian propran respondecon koni al Nekonato Ĉiopova, kiun li aŭ ŝi nomas *Dio*. Sia timo igas lin aŭ ŝin aĉeti fikcian trankviliĝon per sia libereco, komprenemo kaj ĝuo pri vivo. Ĉio inda estas peka, kaj li aŭ ŝi volonte rezignas pri ĝi, por ke sia eta animo —ĉu iu iam ajn vidis ĝin?—, ni diru *memo*, ripozu.

Teisto diras, ke homo estas tiom grava, ke Dio kreis ĝin, kaj donis al ĝi la tutan universon, kondiĉe, ke ĝi sekvu la ordonojn de Dio. Tamen, ateistoj ne sekvas tiajn ordonojn, kaj ankoraŭ la luanto ne forpuŝis nin de tiu vastega domo, la Universo.

Teistoj asertas multe da sensecaĵo, kiun ili nek povas nek deziras rezoni. Ni, male, rezonu pri scienco, tiel pruvante, ke ne religio estas scienco por ni.

Laŭ mi ekzistas nur tio, kion mi vidas. Ĉu ekzistas la Universo? Mi ne scias. Ni konsideru pri tiu teorio, ke eble ĝi ekzistas. Ekzistas, kompreneble, mia domo, miaj amikoj, mia urbo, pli granda peco da lando, kiun oni nomas regionon, nacion, eĉ planedon. Almenaŭ, ne estas

kontraŭdiroj inter tiu akcepto mia, kaj mia persona esperto.

Ĉu mi vivos post mia morto? Mi ne scias. Ĉu ekzistas Rusio? Mi ankoraŭ ne estis tie, sed mi konas homojn, kiuj vizitis ĝin, kaj serioze asertas al mi, ke ĝi ekzistas. Ĉu mi konas seriozajn homojn, kiuj jam estis en la Pretermorto, kaj venis kaj diris al mi pri ĝi? Ankoraŭ mi ne trovis. Ĉu malĝojigas min tio, ke mi ne certas, ke post mia morto, mi ne plu ekzistos, nek ĉi tie, nek en la alia loko? Nu, ne terurigas min la penso, ke antaŭ mia naskiĝo mi estis nenie. Do, timi pri postmorto



estas senseca afero de teistoj. Se ili estas konvinkitaj pri tio, ke post morto venos Aĝa Barbulo, kiu rezonigos ilin pri ĉiu ajn ero de iliaj vivoj, sub la lumo de aro da kontraŭnaturaj leĝoj, kiuj estas tute neeble plenumi, ili ja havas problemon. Mi povas kompreni, ke ili ne emos mortu. Mi, male, kvankam mi ne serĉas morton —vere mi ne konas ion pli bonan ol ĉi tiu vivo, do mi intencas resti en ĝi tiom longe, kiom mi povos—, kiam mia momento venos, mi ne timos foriri de la sceno. Bedaŭrinde, ne estos barbulo al kiu kulpi pri miaj ĝenoj kaj malfeliĉetoj dum ke mi vivis. Pri la ĝojoj, mi komprenas, ke ili venas ĉiam de mia persona agado —same kiel preskaŭ ĉiuj malĝojoj—, ĉar mi ĉiam emis persvadi homojn rideti, por ke ili ridetigu min.

ATEO

Por ke neniam plu venu Inkvizicio, pensu kaj reagu.

